Denove mi sidis supre sur la pordego. La soldatoj estis revenantaj en taĉmentoj el sia postpordega ekzercejo — bonege! Sed mirinde, hodiaŭ mi rigardis ilin kun ia embarasa malplezuro. Alian fojon la rigardo je ili ekscitis min, la sola tamburado sufiĉis por senkatenigi la plej brilantan fantazion; eĉ, se ĝi ne estis, mi lude en pensoj imagis vibrantajn, entuziasmantajn sonojn de turka muziko, mi vidis min en la frunto sur spireganta blankĉevalo, ĵus revenantan el la venkoriĉaj militoj; post mi soldatoj gaje kantantaj heroajn kantojn, ĉirkaŭ mi la ĝojeganta popolo, mi kun senmova vizaĝo, klinanta sole iufoje kaj tute malmulte la kapon. Sed hodiaŭ la fantazio estis kiel biero restinta de hieraŭa tago, senguste malfreŝiĝinta, el kiu la patrino kuiris por si biersupon malamatan de mi. La kapo ne volis fiere leviĝi, la lango estis kvazaŭ ĝi estus maldike kovrita per angilo. Kiam iu el la soldatoj hazarde rigardis supren al mi, mia rigardo rapide direktis sin flanken.

Mi fiksis mian rigardon en la pejzaĝon. Senbrua gajeco, kvazaŭ sur montetojn kaj en valojn mallaŭte falus pluvo de pecetforma oro. Sed tamen la pejzaĝo havis neordinaran elegian karakteron — mi ekstremis spite varmoplena aero.

Mi direktis la rigardon supren al la blua firmamento. Mi denove rememoris Manjon. — Mia kara knabino! Sed ŝajnis al mi, ke mi iomete timas ŝin en tiu ĉi momento. La penso preteriris. — Nu, tamen — Žižka venkis kun tute negranda amaso da homoj cent mil krucmilitistojn — la heroo Percival mortigis cent armitojn en daŭro de unu horo — sed dio scias, kiel tio okazas — multefoje eĉ la historio ne posedas la konvinkantan forton — malfreŝiĝinta biero, argilo sur la lango.

Ne — neeble — cedo estas neeblo — estu!

Nun jam eliradis el la pordego pli multe da homoj ol antaŭe. La rigardo observis ilin senpense. Poste denove komencis senvole la superstiĉa ludo kaj same senvole mi nun uzis en ĝi artifikon. Mi rigardis en vetado favora por mi



sole tiujn, kiuj havis rimarkeblan veston de vilaĝanoj kaj pri kiuj sekve oni povis kun granda verŝajno supozi, ke ili iros kredeble maldektren, eksteren al Podbaba.

Subita febro ekkaptis min — mi penplene leviĝis.

Prefere denove fari inspektan rondiron! Cetere la senkompata devo jam vokas.

Kiam per potencaj paŝoj — sed mi mem sentis, ke nun ili ne estas tro potencaj — mi denove proksimiĝis al Prokúpek, tiam la inspektanta oficiro ĵus eniris en la citadelon. Ni atentos tamen, ĝis kiam li eliros.

Sed sur la vizaĝo de Prokop Holý mi rimarkis alabastran palecon.

»Joĉjo, vi timas,« mi diras kun sincera kunsento.

Prokop Holý ne respondis. Li metis la montran fingron de la dekstra mano sub la dekstran okulon kaj li detiris la suban palpebron tiamaniere, ke oni povis vidi la internan ruĝan randon. Konata montrosigno de la Praha'a junularo, kiu parole interpretita signifas absolutan negacion.

Kial li tamen ne diris, ke li timas! Aŭstrio povis ankoraŭ esti — —

»La dek unua,« ekbalbutis Prokop Holý.

Dek unu sonorbatoj malrapide faladis malsupren tra varmoplana aero. Ĉiu bato longe baraktis apud la oreloj kaj mi senvole ekrigardis supren, ĉu tiu sono ne estas videble korpigita. Potencaj estis la batoj, kiuj tie anoncis la morton de unu el la plej malnovaj kaj la plej grandaj regnoj de Eŭropo.

Ankoraŭ unufoje mi malrapide ĉirkaŭiris la militan pozicion de Mikuláš z Husi kaj poste malsupreniris al Prokúpek. Ŝajnis al mi, ke mi devas ankoraŭ iel vigligi lian atentemon per armeestra averto.

Prokúpek sidis ankoraŭ sur la balustrado, sed li jam ne fumis cigaredon, ĉar nun li havis inter genuoj ĉapon plengigitan per prunoj. Li manĝis kun granda apetito, li zorge elprenis ĉiun kernon el la buŝo, metis ĝin sur la montran fingron, apogis je ĝi la dikan fingron, streĉis — kaj jam kun laŭta ĝemo kuris for iu el la kokinoj, kiuj promenis sur la alia flanko de la strato. Jam preskaŭ ĉiuj forkuris en sendanĝeran malproksimon, sole unu nigra kokino ankoraŭ pikis angilon iom nesingarde proksime. Prokúpek ĵus celis ankaŭ ĝin, kiam li ekvidis min. Tuj la pafanta dikfingro ekcelis alian direkton kaj la kerno trafis anstataŭ la kokinon mian menton tiel akre kaj morde, kvazaŭ iu estis frapinta min per finaĵo de vipo. La vizaĝo de Prokúpek ekbrilis pro feliĉego.



»Kion vi faras? Vi ne atentas?«

»Mi? Kiel! Mi ne havas okulojn, ĉu ne vere? Ĉu vi volas?«

»Mi ne estas malsata. Kiom ili kostas?«

«Ok krejcerojn. Prenu.»

»Mi prenos kvar por Joĉjo. — Atenton! Ĉiun momenton li povas jam veni.«

Kaj mi denove iris supren. Ankoraŭ mi sentis, kiel kerno dolorplene trafis mian orelon, sed mi ne ekrigardis returnen, mi majeste marŝis pluen.

Estis la duono de la dek dua, kiam mi denove estis ĉe Prokop Holý. Li ankoraŭ kuŝis streĉita en herbo.

»Prenu prunojn — ili estas de Fraĉjo.«

Prokop Holý forpuŝis mian manon. Mi metis prunojn antaŭ lin kaj ankaŭ min mem, sur dorson en herbon.

La firmamento sen nuboj. Sed, kiam oni rigardas supren, tiam iom post iom la vido malfortiĝas kaj ŝajnas, ke en la aero sole svarmas blankaj kurbiĝantaj vermoj. Ne sole la rigardo, sed preskaŭ mia tuta korpo estis plena de tiuj vermoj, la sango baldaŭ saltis baldaŭ ĝi haltis, jen konvulsiis unu muskolo, jen la alia. Kvazaŭ fandita plumbo gutus el la ĉielo.

Mi turnis min flanken, vizaĝon al Prokop.

Sonis tri kvaronoj.

»Vi — aŭskultu —« subite turnis sin Prokop Holý al mi kaj en liaj okuloj estis videbla konsterniĝo, »se Pohorák perfidis nin!«

»Estas neeble —« mi ekbalbutis. Sed mi estis maltrankviligita, mi leviĝis kaj iris tien kaj returnen. La plej teruraj pensoj pri la nigra perfido plenigis mian kapon.

Subite mi ekrigardas tra l'arbetaĵo al la vojo — tra la valo kuregas supren Prokúpek, kiel rapide li povas.

»Prokúpek!« — kaj la unua penso estas: ni forkuru!

Prokop Holý jam ankaŭ staris. De la alia flanko rapidas ĉi tien Mikuláš z Husi. Li ankaŭ vidis kurantan Prokúpek.

Prokúpek apenaŭ povas spiri, »Veturigistoj trinkantaj tie antaŭ la butiko rakontas, ke ĵus nun sur foirejo policisto arestis legomvendiston!«

Neniu diris: »Tio estas Pohorák!« Sed kvazaŭ kiam multepeza ŝtono falus inter birdojn, ni jam estis sur ĉiuj flankoj.

Mi kuregis tra la valo malsupren tiel, ke la kapo tremegis. En la momento mi estis en la strato de Valdštýn,



sed ia instikto pelis min pluen. Mi flankeniris en la straton Senovážná, la linioj de pavimo flugis sub miaj piedoj. Jam mi estis antaŭ la preĝejo de Sankta Tomaso kaj mi intencis tra domlaŭbo ĉirkaŭanta la placon supren — la unua kolono pasis — jen mi haltis en kurado kaj premis min al la dua kolono.

Ĵus policisto enkondukis en la apudan policejon Pohorák'on, veturileton kaj hundon. Mi bone vidis, ke Pohorák estas potence kortuŝita. En lia vizaĝo estis neesprimebla doloro. (Fino).



## RŪZNÁ SDĚLENÍ.

**Přátelé „Svazu čes. esp.“ a sjezdy esperantistů v Praze.**  
Docházejí nás dotazy četných známých i neznámých přátel, jak mají se zachovati ke sjezdům esperantistů, které budou se konati v září v Praze. Na to odpovídáme hromadně a veřejně: Co se týče sjezdu Unie českých esperantistů, neprávem zvaného »sjezd českých esperantistů«, jest samozřejmo, že opravdový a upřímný přítel »Svazu čes. esp.« sjezdu toho se nesúčastní. Sjezd, který pořádá jen jedna strana českých esperantistů a z něhož jsou četní příslušníci strany druhé brutálně vylučováni, není sjezdem českých esperantistů, je pouze podnikem stranickým, jež podporovati není možno straně druhé. Kde není místa pro všechny členy »Svazu čes. esp.«, tam není místa pro nikoho z nich — to je naprosto samozřejmé a tím bude se přísně řídit nejen každý člen »Svazu čes. esp.«, ale i každý jeho upřímný a opravdový přítel! Co se týče t. zv. II. konference rakouských esperantistů, dlužno se řídit usnesením »Svazu čes. esp.«, jež dosud učiněno nebylo, jež však včas bude členům oznámeno prostřednictvím sekretářů sdružených spolků. Svaz původně se usnesl, že — vzdor tomu, že byl neoprávněně vyloučen z pořadatelství sjezdu — sjezdu se loyálně súčasťní; když však přihlášky některých členů Svazu byly odmítnuty a když dvěma našim řečníkům (Bouškovi a Kamarytovi) odepřeno bylo slovo na sjezdu, Svaz musí znovu pojednati o tom, jak se po tomto hrubém znásilnění má ke sjezdu zachovati. Ježto usnesení dosud nemohlo býti učiněno, nechť každý náš přítel je připraven i na (pravděpodobnou) účast na sjezdu i na možné zdržení se od účastenství. Zatím vyzýváme členy Svazu důrazně, aby usnesení, které jim sdělí sekretáři spolků, pokládali za naprosto závazné a přísně je zachovali. Od slušných členů »Unie čes. esp.« pak očekáváme, že budou míti tolik mravní síly a odvahy, aby se ohradili důrazně proti tomu, aby hnutí naše bylo znesvěcováno znásilňováním a chlapectvím. Bylo by velice smutné kdyby mezi samými členy »Unie čes. esp.« nenašli se lidé, kteří by se postavili proti zřejmému násilí a chlapectví, které musí naše hnutí diskreditovati ve veškeré veřejnosti. Toť naše stanovisko a mínění, které jistě bude sdílet každý náš přítel, třebaž zde nemůžeme mluvit a nemluvíme za Svaz, který své mínění a své stanovisko prohlásí oficiálně teprve později. Upozorňujeme jen, že lze s velikou pravděpodobností ba jistou, čekati výzvu k účasti na konferenci esperantistů rakouských a prosíme členstvo, aby v tomto případě přísně dbalo pokynů sekretářů.

*Redakce.*

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.



## PROBLEMOJ KAJ OPINIOJ.

**Abomena perforto inter esperantistoj** (Nova dokumento pri la perforto de s-o E. d. Kühnl). Ni devas sciigi al la esperantistaro vere nekredblan fakton, pri kiu ĝi certe legos kun la plej granda abomensento. Jen, kio okazis: La lastjara unua kongreso de l'aŭstriaĵ esperantistoj decidis, aranĝi la duan kongreson en Praha, kaj ĝi komisiis (malprave) unu el du centraj organizaĵoj de la bohemiaj esperantistoj, »Boheman union esperantista«, prepari tiun ĉi manifestacion. Bohema unio esperantista efektive anoncis, ke ĝi preparas la kongreson kaj per publika alvoko ĝi sola invitis, partopreni en la kongreso (konferenco) per la vizito kaj paroloj. La alia centro de la bohemiaj esperantistoj, »Bohema asocio esperantista«, kvankam grave ofendita per tio, ke ĝi ne estis kunaranĝanto de la kongreso, decidis, partopreni en la kongreso per grandnombra vizito de siaj membroj kaj per paroloj de tri siaj komitatanoj, de la prezidanto (prof. dr. Stan Kamaryt: La signifo de esp. por la aŭstriaĵ nacioj), ĝenerala sekretario (financa komisario Mil. Schmidt: Organizaj principoj de l'esperantisma movado) kaj unua sekretario (profesor-kandidato H. K. Bouška: Komuna organo de l'aŭstriaĵ esperantistoj). La delegitaj parolantoj de la Asocio sendis al la Unio — ĉar ĝis nun ne estas konata la prepara komitato de la konferenco — sian aliĝon kaj anoncis siajn parolojn. S-oj Bouška kaj Kamaryt responde ricevis pere de advokata kancelario rekomenditajn leterojn, kiujn ni enpresas en bohema originalo (kun ĉiuj — multaj — ortografiaj, gramatikaj kaj stilaj eraroj kaj kriplaĵoj) kaj en fidela esp. traduko. Jen la teksto de tiuj gravaj dokumentoj pri tio, kian spiriton kaj kiajn morojn vastigas inter la bohemia esperantistaro s-o Eduard Kühnl:

V Praze 12. srpna 1911. Panu Ph.Dr. Stan Kamarytovi ve Velešíně. — Bylo mi uloženo funkcionári Ústředního svazu českých esperantistů Bohema Unio esperantista odpověděti na Váš doporučený dopis z Velešína ze dne 3. srpna 1911. takto: — Vzhledem ke způsobu Vašeho vystupování proti snahám a pracím Ústředního svazu a proti jeho funkcionářům, o němž se šíře zmiňovati není mou úlohou a který je Vám zajisté dobře znám a pro který jsou četné doklady zde, usneslo se komité sjezdové, nepřijmouti Vaši přihlášku ku sjezdu i s oznámenou Vaší přednáškou a obnos 1 K zaslaný na legitimaci sjezdovou: Konference rakouských esperantistů Vám vrátiti. — O tom Vám dávám věděti a obnos 1 K Vám zasílám ve známkách poštovních zpět. — S veškerou úctou se znamenám Dr. Nevšimal.

V Praze, 20/VIII. 1911. Panu Hynku Bouškoví, redaktoru měsíčníku »Český esperantista« na Smíchově. — Dopisem svým ze dne 14. srpna 1911 ráčil Jste Unii Českých

En Praha la 12an de aŭgusto 1911. Al sinjoro PhDr. Stan Kamaryt en Velešín: — Mi estis komisiita de la komitatanoj de la Centra asocio de bohemiaj esperantistoj Bohema unio esperantista respondi Vian rekomenditan leteron el Velešín de la 3. de aŭg. 1911. tiel: — Rigardante la manieron de Via konduto kontraŭ la penoj kaj laboroj de la Centra asocio kaj kontraŭ ĝiaj komitatanoj, pri kiu pli detale paroli ĉi tie ne estas mia tasko kaj kiu estas al Vi certe bone konata kaj pri kiu troviĝas multnombraj dokumentoj ĉi tie, la kongresa komitato faris decidon, ne akcepti Vian aliĝon al la kongreso kune kun Via anoncita parolo kaj redoni al Vi la sumon de 1 K sendita por kongresa legitimacio: Konferenco de l'aŭstriaĵ esperantistoj. — Pri tio mi sciigas Vin kaj mi resendas al Vi en poŝtmarkoj la sumon 1 K. — Kun plena respekto mi subskribas min Dr. Nevšimal.

En Praha, 20/VIII. 1911. Al sinjoro Hynek Bouška, redaktoro de la monata revuo »Bohema esperantista« en Smíchov 730. — Per sia letero de la 14a de aŭgusto 1911



Esperantistů sděliti, že na letošní konferenci rakouských Esperantistů přednesete referát pod názvem: »Společný orgán rakouských Esperantistů«, a žádal Jste, aby referát tento zařaděn byl do programu sjezdu a aby Vám oznámeno bylo, kdy na tento referát dojde. — Funkcionáři »Ústředního Svazu Českých Esperantistů Bohema Unio Esperantista« bylo mně uloženo zděliti Vám usnesení sjezdového komité, nepřijmouti Vaši přihlášku ke konferenci rakouských Esperantistů, jakož i zamítnouti ohlášený referát »Společný orgán rakouských Esperantistů«, nejen vzhledem ku způsobu Vašeho vystoupení proti úspěšným snahám a pracem »Ústředního Svazu Českých Esperantistů«, ale i pro soustavné napadání a urážení předních a zasloužilých funkcionářů, jako pp. profesora D-ra Rosického, odb. uč. Svačiny a Jeřábka, Inž. Fr. Kühnla a Ed. Kühnla, redaktora »Časopisu Českých Esperantistů«, p. Procházky, Tobka a mnohých jiných ve Vašem měsíčníku »Český Esperantista«, dále pak pro znehodnocování a snižování činnosti spolků v Unii sdružených — kterážto Vaše činnost jest obecně známa, a propagační nazvána býti nemůže, jak toho zájem a důstojnost sjezdu vyžadují. — Dávaje Vám o tomto usnesení věděti, znamenám se Vám s úctou D-r Aug. Nevšimal.

Sekve: »Bohema unio esperantista«, propre s-o Ed. Kühnl, uzurpas por si la rajton fari decidojn pri tio, kiu povas partopreni en la kongreso de l'aŭstriaĵ esperantistoj ĉu kiel simpla aŭskultanto ĉu kiel parolanto. S-o Kühnl kuraĝas eligadi el la komuna manifestacio de ĉiuj aŭstriaĵ esperantistoj la personojn, kiuj malplaĉas al li, kiujn li malamas. S-o Kühnl eligas la samideanojn, kiuj volas kaj deziras kunlabori kaj kiuj estas pretaj kaj kapablaj kunlabori. S-o Kühnl malbonuzas la komunan manifestacion por persona venĝo kaj montro de sia malamo! Neniam ie okazis io simila! S-o Kühnl videble volas regi ne sole la tutan boheman, sed ankaŭ la tutan aŭstrian esperantistaron, kaj por atingi tion li ne timas uzi brutalan kaj abomenan perforton, sovaĝan silentigadon de personoj malagrablaj al li. S-o Kühnl ne hontas malsanktigi nian puran aferon per perfortaĵoj, senkredigi ĝin en la okuloj de la neesperantista publiko per brutalaĵoj. S-o Kühnl danĝere kompromitas ĉe la ĝentilaj homoj ne sole la boheman, sed la tutan aŭstrian esperantistaron, en kies nomo li praktikas tiajn abomenajn farojn. Kun vera hontento ni sciigas tiun ĉi nekredeblan, sed veran fakton, al la esperantista publiko, por ke la esperantistaro ĝenerale kaj la aŭstria speciale sciu, en la manoj de kiaj homoj estas la manifestacio de la ideo pri la universala interkopreniĝo kaj kunfratiĝo inter la nacioj! *H. K. Bouška.*

Vi bonvolis sciigi al Bohema unio esperantista, ke en la nunjara konferenco de l' aŭstriaĵ esperantistoj Vi prezentos raporton kun titolo »Komuna organo de l' aŭstriaĵ esperantistoj«, kaj Vi postulis, ke tiu ĉi referato estu envicita en la programon de la kongreso, kaj ke oni sciigu al Vi, kiam venos la vico de la raporto. — La komitatanoj de la centra asocio Bohema unio esperantista komisiis min, sciigi al Vi la decidon de la kongresa komitato, ne akcepti Vian aliĝon al la konferenco de l' aŭstriaĵ esperantistoj, kaj same malakcepti la anoncitan raporton »Komuna organo de l' aŭstriaĵ esperantistoj«, ne sole pro la maniero de Via konduto kontraŭ la sukcesplenaj penoj kaj laboroj de la centra asocio Bohema unio esperantista, sed ankaŭ pro la sistemaj atakoj kaj ofendoj de la ĉefaj kaj meritplenaj komitatanoj, ekzemple de s-oj prof. dr. Rosický, fakinstruistoj Svačina kaj Jeřábek, inĝ. Fr. Kühnl kaj Ed. Kühnl, redaktoro de »Čas. čes. esp.«, s-o Procházka, Tobek kaj multaj aliaj en Via monata revuo »Bohema esperantista«, plue pro la malindigado kaj malaltigado de l' agado de la societoj grupigitaj en la Unio — kiu Via agado estas universale konata kaj ne povas esti nomata propaganda, kiel tion postulas la intereso kaj majesto de la kongreso. — Sciigante al Vi tiun ĉi decidon mi subskribas min respektplene Dr. Aug. Nevšimal.



## La aŭstria esperantistaro kaj la perfortaj faroj de „Bohema unio esperantista“.

*Alvoko al la partoprenontoj en la II. konferenco de l'aŭstriaj esperantistoj, precipe al la nebohemiaj kongresanoj kaj al la membroj de »Boh. unio esp.« Samideanoj!*

Certe por ĉiu el vi estas absolute evidente, ke en la kongreso de l'aŭstriaj esperantistoj havas la rajton libere enesti kaj paroli ĉiu aŭstria esperantisto. Certe por ĉiu el vi estas absolute evidente, ke neniu aŭstria esperantisto povas esti perforte eligata el la partopreno en la kongreso de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj. Certe por ĉiu el vi estas absolute evidente, ke nek iu societo nek iu persono havas la rajton malpermesi al iu ajn aŭstria esperantisto la liberajn eniron kaj parolon en la kongreso de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj. Certe por ĉiu el vi estas absolute evidente, ke neniu organiz-aĵo kaj neniu individuo havas la rajton uzi la komunan kongreson de ĉiuj aŭstriaj esperantistoj por siaj propraj, personaj celoj, precipe ne por montri sian malamon kaj malplaĉon al personoj malagrablaj al ĝi.

Kaj tamen: la aranĝantoj de la II. konferenco de l'aŭstriaj esperantistoj (Bohema **unio** esperantista) arogante rifuzis la aliĝon de l'esperantistoj, kiuj malplaĉas al s-o Kühnl, kaj ili brutale malakceptis la parolojn de du samideanoj, kiuj estas komitatanoj de l'alia centro de la bohemiaj esperantistoj (Bohema **asocio** esperantista). Kiam la prezidanto de »B. a. e.« prof. dr. Stan Kamaryt anoncis sian parolon pri la signifo de esp. por la aŭstriaj nacioj kaj la unua sekretario de »B. a. e.«, redaktoro de l'unua bohemesperanta revuo »Bohema esperantisto« prof.-kand. H. K. Bouška anoncis paroli pri la komuna organo de l'aŭstriaj esperantistoj, ili responde ricevis pere de advokata kancelario la komunikon, ke »Boh. unio esp.« ne akceptas iliajn aliĝojn kaj parolojn pro ilia konduto kontraŭ »Boh. unio esp.«, respektive kontraŭ s-o Kühnl.

Samideanoj! En via nomo s-o Kühnl faris perforton, kiu estas unika en la historio de esperanto: ĝis nun nenie sur la mondo (krom Bohemujo) iu estis eligita el esperantista kongreso. En via nomo s-o Kühnl faris perforton, kiu estas terura makulo en la aŭstria esperanto-movado: kun la rememoro je la II. konferenco de l'aŭstriaj esperantistoj restos medisigeble kunigita la rememoro je sovaĝa perforto. En via nomo s-o Kühnl faris perforton, kiu grave kompromitos ne sole la tutan aŭstrian esperantistaron, sed la esperantisman mem: ĉiu tute prave montros, ke la esperantistoj postulas esti aŭskultataj, sed ke ili mem ne volas aŭskulti siajn kunbatalantojn.

Samideanoj! Ĉu vi permesos, ke s-o Kühnl en via nomo malsanktigu nian puran aferon per perfortoj? Ĉu vi permesos, ke s-o Kühnl absolutisme faru decidon pri tio, kiu povas kaj kiu ne povas partopreni en via konferenco? Ĉu vi permesos, ke s-o Kühnl perforte eligadu el via konferenco la laborantojn sole pro tio, ke li malamas ilin? Ĉu vi permesos, ke s-o Kühnl uzu vian komunan kongreson por internaj aferoj de la bohemiaj esperantistoj kaj por siaj personaj celoj? Ĉu vi permesos, ke s-o Kühnl regu vin, la tutan aŭstrian esperantistaron, kiel li volas regi la bohemanojn?

Samideanoj! La faro de s-o Kühnl devas eksciti kaj inciti ĉiun justan kaj honestan homon, ĝi devas aperigi energian proteston kaj fortan kontraŭstaron de ĉiuj personoj, kiuj havas sencon kaj senton por justeco, lojaleco kaj libereco. Sole la homoj arogantaj, perfortemaj, sovaĝaj povas konsenti kaj aprobi, kion »Boh. unio esp.« faris laŭ la ordono de s-o Kühnl. Kaj, se vi senproteste silentos, se vi permesos, ke la decido de s-o Kühnl estu plenumita, tiam vi mem fariĝos kunrespondaj kaj kunkulpaj en tiu ĉi hontinda afero. Vi ĉiuj kune kaj ĉiu el vi apartel!

Samideanoj, pripensu la konsekvencojn de tio, se oni permesos tiajn senmoralajojn: Hodiaŭ oni eligas nin, morgaŭ oni povus eligi iun alian, eble ĉiun el vi. Hodiaŭ oni eligas nin el la bohemiaj kaj aŭstriaj kongresoj morgaŭ oni povus eligi nin aŭ vin aŭ kiun ajn alian el la universalaj. Hodiaŭ oni eligas iun, kiu malplaĉas al s-o Kühnl, morgaŭ oni povus eligi iun, kiu estas malamata de iu alia, ekzemple de s-o Regemulo aŭ de s-o



Profitemulo aŭ de kiu ajn alia. Ĉu estas tiom da laborantoj por esperanto, ke oni povus sen malutilo eligadi ilin? Ĉu oni povas permesi tion? Kien ne venus, se ni tion permesus? Eĉ se iu farus la plej grandan malbonon al iu el la aranĝantoj de la konferenco, neniu povas eligi lin el ĝi pro tio, ĉar la malpacigo inter tiuj personoj estas ilia persona afero indiferenta por la konferenco; ĝi neniel tuŝus la konferencon kaj neniu povus eligata el la konferenco pro ĝi. Tion povas neniu permesi kaj tion certe ne permesos vi, kiuj kunvenos en Praha por partopreni en la II. konferenco de la aŭstria esperantistoj!

Samideanoj! Via honora devo estas forigi tiun ĉi maljustaĵon! Via honora devo estas laŭtege protesti kontraŭ tiu ĉi perfortaĵo, energie montri viajn malkonsenton, malplaĉon kaj malaprobos pri tiu ĉi faro! Ne timu defendi la rajton, la liberecon kaj justecon!

**Samideanoj!**

Tuj en la komenco de la malferma kunsido de la konferenco

1. protestu energie pro la perforto farita en via nomo;
2. postulu energie la absolute liberan eniron al la personoj, kiu petos kaj pagos kongresan karton;
3. postulu energie la absolute liberan parolon por tiuj, kiuj deziros paroli;
4. postulu energie la lokon en la kongresa estraro por la nacioj kaj partioj, kiuj partoprenos en la konferenco!

**Samideanoj! Ne permesu malfermi kaj fari konferencon, se viaj justaj postuloj ne estos senescepte tuj plenumitaj!**

Samideanoj! En viaj manoj estas la justeco. Mi provis veki vian konsciencon. Faru, kion ĝi mem ordonas al vi! Ĝi kaj la historio estos viaj juĝantoj.

*H. K. Bouška.*

NB. Legu ankaŭ la artikolon »Abomena perforto inter esperantistoj« (en »Boh. esp.«) enhavantan dokumentojn pri la rakontita fakto.

## **El la verkoj de grafo L. N. Tolstoj**

eldonitaj de la grafino Tolstoj nur post la morto de l' aŭtoro kaj tuj kondamnitaj de la Moskva'a juĝistaro por esti detruitaj aperis **esperante** detala, tre rimarkinda, sed malmulte konata artikolo

### **La patriotismo kaj registaro,**

tradukita en esperanton de rusa samideano **Blindkopf.**

Ĝi estis publikigita sole en la IV. jarvolumo de l' unua bohem-esperanta revuo »Bohema esperantisto«, kiu enhavas vicon da amuzigaj kaj klerigaj, originalaj kaj tradukitaj artikoloj esperantaj verkita; aŭ tradukitaj de multaj eminentaj esperantistoj diversnaciaj. Precipe rimarkindaj estas artikoloj: Deveno de la religio (F. V. Krejčí-H. K. Bouška), Moderna amo (prof. dr. T. G. Masaryk-Rud. Hromada), Antisemitismo kaj progreso (Jos. Eydelnanth), Propagando de internaciaj movadoj (prof. dr. Kamaryt) k. m. a.

La tuta jarvolumo kostas sole Sm. 1'30 (antaŭe senditajn)! Specimena numero de la revuo estas sendata sole kontraŭ respondkuponon! De l'administracio de »Boh. esp.« estas ankaŭ riceveblaj **esperantaj glumarkoj**: 100 ekzempl. Sm 0'30, 500 ekzempl. Sm 1'25. — La mendojn akceptas: Administracio de la revuo **Bohema esperantisto, Praha-III., Kampa 495, Bohemujo—Aŭstrio.**